# Esperanto - La Bitbulteno 90

esperanto.es

## COMIENZA PRONTO EL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO EN SEVILLA

Ya estamos a las puertas del Congreso Español de Esperanto, en Sevilla. El congreso empieza este próximo jueves 12, y se clausurará el 15 de octubre, pero todavía estás a tiempo de apuntarte.

Encontrarás las informaciones básicas y el boletín de inscripción en la dirección kongreso.esperanto.es. También puedes descargarte el programa y consultar la lista de inscritos, unos 150 de alrededor de veinte países.

Recuerda también que se ha programado un precongreso universitario el 10 y 11 de octubre, en las Facultades de Filología y Psicología, que contará con la participación de un importante panel internacional de ponentes, y al que pueden asistir los inscritos en el congreso. La información se encuentra en este enlace.

Algunos medios de comunicación se empiezan a hacer eco del congreso. Podemos destacar la noticia publicada en la web de la Cadena Ser de Sevilla. Y también podemos anunciar que el programa "Memoria de delfín" de Radio Nacional de España tiene previsto dedicar su emisión de ese fin de semana (a partir de las 0,05 del día 16) al esperanto.




## NUEVOS CURSOS EN LA UNIVERSIDAD NACIONAL DE EDUCACIÓN A DISTANCIA

Continúa abierto hasta el 23 de octubre el plazo de inscripción a los cursos de esperanto organizados por la Universidad Nacional de Educación a Distancia (UNED), con la colaboración de la Federación Española de Esperanto. Recordamos que son cursos en línea, mediante el Campus Virtual de la UNED, con profesores y asistentes de conversación, con un título oficial de la UNED, y que se imparten en dos niveles, el nivel A2 (básico) y B1. Puedes ver la guía del curso y matricularte en la web http://www.cuid.uned.es ("modalidad en línea").

Importante: los miembros de la Federación gozan de una importante bonificación en el precio del curso. Infórmate en la dirección de HEF y aprovéchalo.

Más detalles, en este enlace.

## ESPERANTO EN ENSEÑANZA MEDIA

En el programa del congreso español de esperanto se dedicará un apartado a la presentación de las experiencias de enseñanza del esperanto en la Enseñanza Media, concretamente en el Instituto Almenara de Vélez-Málaga, con participación de alumnos del mismo.

También debemos mencionar el caso de la localidad cordobesa de Lucena, en cuyo Instituto Marqués de Comares, durante el pasado curso se organizó un curso básico de esperanto. Se prevé continuar con la experiencia en este curso 2023-24.

Enhorabuena a Fabián y Juan Diego, respectivos responsables de las iniciativas.




## PRESENTACIÓN DE UN LIBRO SOBRE LA HISTORIA DEL ESPERANTO EN SEVILLA

En el próximo congreso español de esperanto se presentará un nuevo libro, sobre los 125 años de esperanto en Sevilla. En el libro, de 300 páginas, se presentan las distintas fases de la historia de la lengua internacional en la ciudad que alberga este año, por tercera vez, el encuentro de los esperantistas españoles.

Ven al congreso, conoce la ciudad, y descubre la rica historia del esperanto en la capital andaluza.

## LA BIBLIOTECA DE LA FEDERACIÓN EN EL CATÁLOGO COLECTIVO DEL PATRIMONIO BIBLIOGRÁFICO ESPAÑOL

La Biblioteca Juan Régulo Pérez (BJRP), perteneciente a la Federación Española de Esperanto, ya forma parte del Catálogo Colectivo del Patrimonio Bibliográfico Español (CCPB), dependiente del Ministerio de Cultura y Deporte.

Este catálogo colectivo tiene por objeto describir y localizar los libros y otros materiales bibliográficos pertenecientes a bibliotecas españolas, públicas o privadas, que por su antigüedad, singularidad o riqueza forman parte del Patrimonio Histórico Español, e incluye todos los materiales publicados hasta 1958. Lo elaboran conjuntamente el Ministerio de Cultura y Deporte y todas las Comunidades Autónomas.

Nuestra Biblioteca inició el contacto con esta institución en octubre de 2021 y ese mismo mes la Federación firmó un documento que autoriza al Catálogo a dar a conocer los datos y ubicación de nuestros ejemplares. La colaboración entre ambas instituciones ha sido constante desde entonces, y ya es posible ver algunos de nuestros registros en el CCPB.




**RICARDO CODORNIU HOMENAJEADO EN MURCIA Y GUARDAMAR**

Durante estas semanas se está conmemorando la figura de Ricardo Codorniú Stárico, con ocasión del centenario de su fallecimiento. Codorniu fue conocido como "el apóstol del árbol", por sus actividades de repoblación, y también fue un destacado esperantista, el primer presidente de la entonces llamada Sociedad Española para la Propaganda del Esperanto, en 1903.

Su faceta esperantista está siendo recordada en una exposición temática en el Museo de la Ciudad de Murcia, que estará abierta hasta el día 27. Un amplio texto en la web del Museo informa sobre esa relación. Sobre ese tema, y sobre el esperanto en general, el director de la Fundación Esperanto, Toño del Barrio, habló en la radio Onda Regional el día 4 de octubre; puedes escuchar el programa aquí.

Una exposición más general sobre Ricardo Codorniu se ha montado en el Museo de la Ciencia y el Agua de Murcia, que también incluye algunas menciones a su faceta esperantista.

El día del centenario, el 26 de septiembre, el grupo esperantista de Guardamar del Segura (ciudad muy ligada a las actividades repobladoras de Codorniu) organizó una actividad conmemorativa, con una mesa informativa sobre el esperanto junto a la rotonda dedicada a este idioma, con amplia participación de esperantistas locales y de ciudades cercanas, y otras personas relacionadas.




**FALLECIÓ AUGUSTO CASQUERO**

Lamentamos anunciar el fallecimiento de Augusto Casquero de la Cruz, el 19 de septiembre en Valencia.

Esperantista muy veterano y activo, presidente de la Federación Española de Esperanto entre 2005 y 2008.

También presidió durante distintos periodos los grupos de Madrid y de Valencia, y se le recuerda como principal organizador del Congreso Universal de Esperanto de Valencia en 1993, y como profesor de esperanto en varios lugares de España y otros países, como Polonia y China.

La Federación y todos los esperantistas enviamos el pésame a su familia y a sus muchos amigos.



## PARTICIPA EN LAS ACTIVIDADES DE LA FEDERACIÓN

Durante el Congreso Español de Esperanto tendrán lugar actividades organizadas por la Federación Española de Esperanto, entre las cuales el mismo día 12 nuestra Asamblea (cuyo orden del día incluimos en el anterior Bitbulteno).

Las actividades son abiertas para todos los esperantistas, pero te invitamos a que, si todavía no lo has hecho, te apuntes a nuestra asociación, aproveches sus ventajas y colabores en la difusión del esperanto en la sociedad.

## TUJ KOMENCIĜOS LA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO EN SEVILO

Ni troviĝas jam ĉe la sojlo de la 81a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu komenciĝos jam la 12an de oktobro en Sevilo, ĝis la dimanĉo 15a.

Vi trovos la bazajn informojn kaj la aliĝilon en la retejo kongreso.esperanto.es. Vi povas tie elŝuti la programon kaj la liston de aliĝintoj, ĉ. 150 el pli ol dudeko da landoj.

Memoru ke ankaŭ estas programita universitata antaŭkongreso, la 10an kaj 11an de oktobro, en la Fakultatoj de Filologio kaj Psikologio. Ni atendas la partoprenon de ampleksa aro da internaciaj

prelegantoj kaj ĝin povas ĉeesti ĉiuj kongresanoj. La informoj troviĝas en jena ligilo.

Jam kelkaj amaskomunikiloj komencis eĥi la novaĵon. Ni povas elstarigi la raporton publikigitan en la retejo de la sevila stacio de la granda radioĉeno Cadena Ser. Kaj ni povas ankaŭ anonci ke la programo "Memoria de delfín" (*delfena memoro*) de la ŝtata Radio Nacional de España dediĉos sian elsendon de tiu semajnfino (ekde proksimume la 0,05 horo de la 16a de oktobro) al Esperanto.




## NOVAJ KURSOJ EN LA UNIVERSITATO UNED

Ĝis la 23a de oktobro plu estas malfermita la enskribiĝo en la kursoj de Esperanto de la Ŝtata Universitato por Neĉeesta Edukado de Hispanio (UNED), kunlabore kun la Hispana Esperanto-Federacio. Ni rememorigas ke ili estas instruataj rete, kun oficialaj instruistoj kaj konversad-helpantoj, kaj ili estas alireblaj ne nur el Hispanio, sed ankaŭ el multaj landoj el Eŭropo, Latinameriko kaj aliaj kontinentoj en kiuj UNED havas filiojn. Ĝi havigas oficialan diplomon de la Universitato, en du niveloj, A2 (baza en la kazo de Esperanto) kaj B1.

Atentu: la anoj de la Federacio ĝuas konsiderindan rabaton en la prezo de la kurso. Informiĝu ĉe HEF kaj profitu la ŝancon!

Vi povas aliri la gvidilon de la kurso en la retejo http://www.cuid.uned.es ("modalidad en línea"), kaj pli konkrete en tiu ĉi ligilo.




## ESPERANTO EN MEZLERNEJOJ

En el programo de la Hispana Esperanto-Kongreso oni dediĉos eron al la spertoj pri instruado de Esperanto en mezlernejoj, konkrete en la Instituto Almenara de Vélez-Málaga (provinco Malago), kun partopreno de ĝiaj lernantoj.

Oni devas ankaŭ mencii la kazon de la urbo Lucena (provinco Kordovo), en kies mezlernejo "Marqués de Comares", estis organizita dum la pasinta akademia jaro baza kurso de Esperanto. Estas antaŭvidite daŭrigi la sperton dum tiu ĉi jaro 2023-24.

Gratulon al Fabián kaj Juan Diego, respondeculoj de la iniciatoj.



## PREZENTO DE LIBRO PRI LA HISTORIO DE ESPERANTO EN SEVILO

En la venonta hispana kongreso de Esperanto prezentiĝos libro pri la 125 jaroj de Esperanto en Sevilo. En la 300-paĝa libro oni prezentas la diversajn fazojn de la historio de la internacia lingvo en la urbo gastiganta por la 3a fojo la renkonton de la hispanaj esperantistoj.

Venu al la kongreso, konu la urbon, kaj malkovru la riĉan historion de Esperanto en la andaluza urbo.





## BIBLIOTEKO JUAN RÉGULO PÉREZ EN LA KOLEKTIVA KATALOGO DE LA HISPANA BIBLIOGRAFIA HEREDAĴO

La Biblioteko Juan Régulo Pérez (BJRP), apartenanta al Hispana Esperanto-Federacio, integriĝis en la Kolektiva Katalogo de la Hispana Blibliografia Heredaĵo (CCPB), dependa de la Ministerio de Kulturo kaj Sporto de Hispanio.

La celo de tiu ĉi kolektiva katalogo estas priskribi kaj lokalizi la librojn kaj aliajn bibliografiajn materialojn apartenantajn al hispanaj bibliotekoj, publikaj aŭ privataj, kiuj pro siaj antikveco, unikeco aŭ riĉeco estas parto de la Hispana Historia Heredaĵo, kaj inkludas ĉiajn materialojn eldonitajn ĝis 1958. Ĝin preparas kune la Ministerio de Kulturo kaj Sporto kaj ĉiuj Aŭtonomaj Komunumoj.

Nia Biblioteko iniciatis la kontakton kun tiu institucio en oktobro 2021 kaj tiun saman monaton HEF subskribis dokumenton, kiu rajtigas al la Katalogo diskonigi la datenojn kaj lokalizojn de niaj ekzempleroj. La kunlaboro inter ambaŭ institucioj estas de tiam konstanta, kaj kvankam, pro diversaj kialoj la laboro iris malrapide dum la pasinta jaro, eblas jam trovi en la Katalogo kelkajn el la ekzempleroj de nia biblioteko.




## OMAĜOJ AL RICARDO CODORNIU EN MURCIO KAJ GVARDAMARO

Dum tiuj ĉi semajnoj oni diversloke profitas la centan datrevenon de la forpaso de Ricardo Codorniú, por memori lian vivovojon. Codorniu estis konata kiel "la apostolo de la arbo", pro siaj aktivadoj por rearbarigo, kaj estis ankaŭ tre elstara esperantisto, la unua prezidanto de la tiam nomata Hispana Societo por Propagando de Esperanto, en 1903.

Lia esperantista flanko estas nun memorata en tiutema ekspozicio en la Muzeo de la Urbo de Murcio, kiu estos malfermita ĝis la 27a de oktobro. Ampleksa teksto en la retejo de la Muzeo informas pri tiu rilato. Pri la temo, kaj pri Esperanto ĝenerale, la direktoro de la Fondaĵo Esperanto, Toño del Barrio, parolis en la regiona radio Onda Regional la 4an de oktobro; oni povas aŭskulti la intervjuon tie ĉi.

Alian ekspozicion, pli ĝeneralan, pri Codorniu oni montras en la Muzeo pri Scienco kaj Akvo de Murcio, kiu inkludas ankaŭ kelkajn menciojn al lia esperantista flanko.

La esperantista grupo de Guardamar del Segura (urbo ankaŭ tre ligita al la rearbarigaj laboroj de Codorniu) organizis kunmemoran agadon, pere de informa tablo pri Esperanto muntita proksime al la rondiro nomita pro la lingvo, kun ampleksa partopreno de esperantistoj lokaj kaj venintaj el aliaj urboj, kaj aliaj rilataj homoj (vidu suban foton).




## FORPASIS AUGUSTO CASQUERO

Ni bedaŭras anonci la forpason de nia kara amiko Augusto Casquero, tre aktiva movadano, prezidinto de Hispana Esperanto-Federacio inter 2005 kaj 2008.

Li ankaŭ prezidis en diversaj epokoj la asociojn de Madrido kaj de Valencio, kaj la Lokan Kongresan

Komitaton de la Universala Kongreso en Valencio 1993. Li instruis Esperanton en Madrido kaj Valencio, kaj ankaŭ en aliaj landoj, kiel Slovakio, Pollando, Usono kaj Ĉinio.

Li ricevis la Internacian Premion Ada Fighiera-Sikorska, en 2004, pro sia agado en la Esperanto-movado, kaj estis nomumita al la Panteono de instruistoj de la retejo edukado.net.

Augusto estis tre konata pro sia afableco, simpatio kaj ŝercemo. Tuj post la konigo de lia forpaso alvenis multaj agnoskoj kaj kondolencoj. Kiel ekzemplo, la retgazeto La Ondo de Esperanto dediĉis al li artikolon kaj la Pola Retradio elsendis arkivan rememoron kun iama intervjuo al li.

Hispana Esperanto-Federacio kondolencas lian edzinon Alicia, lian familion kaj liajn multajn amikojn en la tuta mondo.

**PARTOPRENU EN LA AKTIVADO DE HEF**

Dum la baldaŭ okazonta Hispana Kongreso de Esperanto estas programataj aktivaĵoj organizataj de Hispana Esperanto-Federacio, inter kiuj, la 12an mem, la Ĝenerala Kunveno de HEF (kies tagordon vi povis legi en pasinta Bitbulteno).

La aktivaĵoj estas malfermaj por ĉiuj esperantistoj, sed ni invitas vin, kaze ke vi ankoraŭ ne faris tion, ke vi aliĝu al nia asocio, profitu ĝiajn avantaĝojn kaj kunlaboru en la disvastigo de Esperanto en la socio.